Baldaŭ unu jaro pasos de post mia translokiĝo al Sapporo (S) el Osaka (O). Intertempe mi rimarkis diferencojn inter la du urboj.

**Cirkonstancoj:** Malbona estas trotuaro, kies malglateco certe turmentas maljunulojn kaj handikapitojn (S). Ĉie svarmas homoj. Oni devas atendi longe en banko, poŝtoficejo ktp (O). Oni povas ĝui la favoron de la riĉa naturo (S).

**Karaktero de urbanoj:** Grandanima, nezorgema, simpleta kaj nehastema (S). Tre (eĉ tro) zorgema, hastema, scivolema kaj ŝparema (O).

**Prezoj:** Ĝenerale, prezoj de varoj estas pli multekostaj (S). Ekzemple, manĝomaterialoj el la tero krom hokkaidaĵoj kostas pli kare. Ankaŭ kaptaĵoj el la maro estas karaj (S). Diverseco de manĝomaterialoj estas pli riĉa (O). Tamen biletoj de koncertoj estas multe malpli karaj. Oni povas aĉeti ilin pli facile (S).

**Klimato:** La seka aero ofte dolorigas mian gorĝon, sed ni profitas ĝin por sekigi lavaĵojn rapide (S). La humida aero regas precipe en somero. Okulvitroj malklariĝas, kiam oni eksteriĝas el klimatizita domo (O). Oni suferas de kaprica vetero. Subite ekpluvas. Ofte blovas tiel forta vento, ke mi eĉ ne povas teni sunombrelon. Sed somere estas ja nekompareble pli agrable! (S)

移り来し街にも馴染み夏の空　後藤純子

ホンナラ、どなたはんもどうぞお気張りやしておくれやす！

Kirikae H. skribas: Mi reedziĝis. La nova edzino, Ĉizu, okhockanino, estis pentristino kaj malnova amikino de mia familio. Ŝi apartenas al la tute sama generacio de mi kaj mia mortinta edzino.

*La ĉielo jam someris, kiam nova urbo intimiĝis.*